

N-ro 3/2005
16a jaro (2a periodo)



Saluton, samgejunuloj!

Jen la unua IND de la somera duonjaro 2005. Ĉi-foje la estraro de NJE ŝatus prezenti al vi la jarraporton por 2004 de nia organizo. Kiel vi vidas, ne estis multaj aktivajoj en Norvegio dum la lasta jaro, sed ni estis parto de pluraj gravegaj internaciaj projektoj. Aldona internacia afero en la estonteco, fakte jam ĉi-somere, estas la tutnordia festivalo KEF – Kultura Esperantofestivalo – en Finnlando, kies organizantoj inkluzivas la famegan kantiston Patrik el Dolĉamar! Jen ĉi-apude la invito al la aranĝo.

*Elkore salutas Heming
Prezidanto de NJE kaj ĉi-foja
redaktanto de IND*



inter ni dirite

- LA JUNULARA FORUMO

Redaktas: Heming W. Thorbjørnsen

Bonvenon al Kultura Festivalo!

Kiel vi certe jam scias, la tutnordia Kultura Esperanto-Festivalo KEF estas aranĝota inter la 16a kaj la 23a de julio ĉi-somere (vidu <http://www.esperanto.fi/kef2005/>).

Denove ni havas la suverene plej interesan programon en Esperantio: de franca teatro kaj barata literaturo al latinamerika muziko kaj nordia ŝamanismo. Rokmuzike ĝi estas ekz. la sola oportuno vive vidi Dolĉamar kaj La porkoj – cetere havante kaj Jomo, Martin Wiese kaj Esperanto Desperado en unu festivalo oni povas esperi surscenejajn kunaperojn 😊 Unu malfeka afero estas ankaŭ, ke la festivalejo situas tramvojaĝete de la centro de Helsinko kaj transtrate de la amuzparko Linnanmäki 😊

La organizantoj FEJO kaj Esperanto-Klubo de Helsinko invitas vin partopreni la aranĝojn de KEF 2005. Ni bezonas surlokajn volontulojn, kiuj povas porti matracojn kaj gardi ejojn. Krome ni ankoraŭ serĉas ekz. unu plian dancigeman DJ-on por niaj noktaj diskejoj kaj pliajn esperantofilmojn.

Mi aŭdis, ke estas ie grupo, kiu subtitoligas filmojn – ĉu eblas montri ilin per videoprojektilo en KEF 2005? Aparte *Populärmusik från Vittula* estus bonega!

Se vi havas aliajn ideojn, ni estas apertaj por ĉiuj proponoj.

Mi petas vin dissendi la mesaĝon al ĉiuj, kiuj povas interesiĝi pri la afero!

Salutas,

Patrik Austin

Finnlanda Esperantista Junulara Organizo

Jarraporto Norvega Junularo Esperantista 2004

ADMINISTRADO

La estraro (elektita 2003) konsistis el
 Heming Welde Thorbjørnsen, prezidanto
 Bjørn A. Bojesen, vic-prezidanto
 Kai Salve Salvesen, sekretario
 Leif Arne Storset, kasisto
 Signe Christophersen, estrarano
 Bård Hekland, estrarano

Estis neniuj estrarkunveno en 2004. Ĉiuj diskutoj kaj decidoj estis farataj retpoŝte.

NJE havis 20 pagintajn membrojn je 31.12.04. (Je 31.12.03: 31.) Unu nova membro pagis la kotizon en la lasta kvarono de la jaro kaj estas kalkulata kiel membro ekde 2005.

ARANĜOJ POR LA MEMBRARO

Ni nenion aranĝis dum 2004.

INTERNA KOMUNIKADO KAJ INFORMADO

Inter Ni Dirite aperis 4-foje en *Norvega Esperantisto*, kun 3 ĝis 4 paĝoj. La estraranoj prizorgis ĝin laŭ vica sistemo. En *IND* aperis plejparte movadaĵoj, sed ankaŭ kelkaj artikoloj pri aliaj temoj.

NJE havas retan dissendliston (nje-listo@nvg.ntnu.no), sed ĝi ne estas multe uzata.

EKSTERA INFORMADO

Bård Hekland prizorgas nian interretan paĝaron. Ni konstatis ke ne eblas regule ĝisdatigi la paĝojn kiujn kreis David-Emil Wickström antaŭ kelkaj jaroj, do la nuna retejo konsistas el simpla paĝo sub www.esperanto.no/nje kun enkonduka mesaĝo, listo de estraranoj kaj ligilo al nia

novaĵpaĝo. Tiu novaĵpaĝo estas blogo kiun Bård kreis en la komenco de la jaro. Dum la tuta jaro li publikigadis diversajn aktualajn informojn tie, inkluzive selektitajn erojn de *Inter Ni Dirite*.

Bård Hekland kaj Heming W. Thorbjørnsen kreis norvegan version de www.lernu.net.

INTERNACIA KUNLABORO

En Internacia Junulara Kongreso (IJK) en Kovrov, Rusio, partoprenis kelkaj norvegoj, sed nur unu NJE-membro. Neniu reprezentis NJE dum la komitatkunsido de TEJO.

Heming W. Thorbjørnsen estis norvega komitato A en TEJO en la komenco de la jaro kaj maje reelektiĝis por la periodo 2004-6.

Dum la jaro Heming W. Thorbjørnsen estis aktiva kunlaboranto en la projekto Interkulturo, kiu celas starigi kulturinterŝanĝan reton por junuloj en Eŭropo (vd. www.interkulturo.net). Ekde majo 2004 NJE estas oficiala kunlabora organizo de tiu projekto, kaj NJE prenis sur sin la taskon peti subvencion de la fonduso Ung i Europa (YOUTH). Ni nomumis Heming kiel nian reprezentanton en la projekto kaj kiel jure respondecan pri la monpeto. Oni ricevis NOK 163 420 por la unua projektperiodo (unuajaro). ILEI prizorgas la buĝeton kaj la kalkulon de Projekto Interkulturo (tial la mono nun estas en ilia konto). (NJE jure respondecas pri duono de la buĝeto de la projekto kaj pri la realigado de la kun BUFA (YOUTH) kontraktitaj aktivajoj, sed ILEI posedas la projekton kaj respondecas pri ĉiuj praktikaĵoj.)

Okazis plankunveno (malfermo de la projektperiodo) en Oslo 22-25 septembro.

Heming ankaŭ partoprenis TEJO-seminarion pri projektmastrumado, monpetado kaj lobiado en Bruselo 29 februaro ĝis 7 marto, en seminario pri instruado en Sarajevo 21-28 marto, kaj en seminario pri projektgvidado en internaciaj junulaj organizoj en Strasburgo 3-10 oktobro.

FINANCOJ

La jarkalkulo de 2004 montras profiton de 5 713,28 kr.

Ni ricevis 6 128,25 kr. (5 % de la tuta subvencio) pro la administra rolo en projekto *Interkulturo*.

Pro la malmulto de aktiveco en NJE nia sola elspezo (krom bankkotizoj) estis

repago de subvencio al Legaco Uhlen. Tio estas subvencio kiun NJE ricevis antaŭe, sed ne uzis.

La bilanco ŝajnas grandega (kr 104 344,30) pro la prizorgado de la mono por Projekto Interkulturo. Kiel la ciferoj montras, 78 226,45 kr. apartenas al tiu.

KONKLUDO

En 2004 NJE estis preskaŭ sen aktiveco. Sed nia prezidanto kunlaboris nome de NJE en la internacia projekto *Interkulturo*, ni sukcesis redakti *Inter Ni Dirite* sufiĉe regule, kaj aperadis utilaj informoj en nia novaĵpaĝo en Interreto.

— FINO DE INTERNiDIRITE —

Faru kiel la redaktanto! Disdonu E-nytt!

Mendu stoketon da *Esperanto-nytt* de nia oficejo por senpaga disdonado.

Oftaj mallongigoj/Ofte brukte forkortelser

NEL	(<i>uttales nå-e-lå</i>) Norvega Esperantista Ligo (<i>Norsk E-forbund</i>)
NEFA	Norvega Esperantista Fervoĵista Asocio (<i>NSB Esperantoforbund</i>)
NJE	Norvega Junularo Esperantista (<i>Norsk esperanto-ungdom</i>)
UEA	Universala Esperanto-Asocio (<i>Verdensforbundet</i>)
SAT	Sennacieca Asocio Tutmonda (<i>uavhengig radikal politisk organisasjon</i>)
TEJO	Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (<i>ungdomsavdelingen til UEA</i>)
ILEI	Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (<i>lærerorganisasjon</i>)
UK	Universala Kongreso – ĉiujara (<i>årlig</i>) internacia aranĝo de UEA
IJK	Internacia Junulara Kongreso – ĉiujara internacia aranĝo de TEJO
IJK	Internacia Infana Kongreseto – ĉiujare samtempe kun la UK
PIV	Plena Ilustrita Vortaro (<i>standardordboken (ettspråklig)</i>)
TTT	TutTera Teksaĵo (<i>Verdensveven på Internett</i>)